

Pri la Fervojista kongreso en Lugano
kaj pri la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo
Claude Gacond, 417-a radioprelego, 1971.10.06 & 09

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la tuta monato septembro kaj ankoraŭ dum la unuaj semajnoj de oktobro estis kaj estos proponitaj al vi, post niaj radio-prelegoj, konkurso kies premio estas senpaga restado okaze de la 24-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

A.- La urbo Lugano ĵus eldonis belan prospekton en esperanto, kiu titolas *Lugano, Suda Svislando*. En novembro, kiam ni respondos al niaj korespondemaj geaŭdantoj, ni sendos al ili ekzempleron de tiu prospekto, se ili ĝin petas.

Cl.- Ili tiel povos ricevi ideon pri la beleco de tiu regiono, kiu situas sude de Alpoj. Kaj la kongres-periodo, 6-a ĝis 12-a de majo, klimato estas tre favora. Lugano estos en plena florado, kaj la montosuproj ankoraŭ havos neĝrestaĵojn. Foto de la ĵus menciita prospekto montras Luganon kaj ties lagon en tiu sezono. Palmarboj pruvas la mildecon de la klimato de Lugano, dum blankaj suproj memorigas, ke ni tamen troviĝas en montara regiono.

A.- Lugano estas unu el la plej sunigitaj regionoj de Svislando. Pro tio ĝi estas tiom ŝatata de la turistoj. La prospekto diras : *Pro sia alta nombro da sunbrilhoroj (pojare 2248 kaj pli), la urbo Lugano kaj ĉirkaŭaĵo apartenas al la plej sunriĉaj lokoj en Mezeŭropo. Dank'al favoraj veter- kaj ter-cirkonstancoj kreskadas ĉi tie subtropikaj vegetaĵoj de aparta beleco, mimozoj, kamelioj, magnolioj kaj oleandro. La fea kolorriĉeco de azaleoj kaj rododendroj, de palmoj, cipresoj kaj agavoj pravigas la karesan nomigon « Riviera de Svislando » por la regiono.*

Cl.- *Lugano ankaŭ estas art-urbo. Interalie estas vizitenda la art-muzeo Villa Favorita, kiu entenas arttrezorojn de la itala, flandra-nederlanda, hispana, franca kaj germana skoloj de mezepoko ĝis la 18-a jarcento.*

A.- *En Villa Favorita vi povos admiri pentraĵojn de Ghirlandaio, Carpaccio, Bramante, Tizian, Rembrandt, van Eyck, Rubens, Dürer, Holbein, Murillo, Velasquez, Chardin, Gainsborough kaj multaj aliaj majstroj de la eŭropa pentroarto.*

Cl.- *Lugano havas interesajn preĝejojn. Santa Maria degli Angioli estis konstruita en 1499. Origine monaĥeja preĝejo, ĝi fariĝis fama pro freskoj de la lombardia majstro Bernardino Luini. La citita prospekto donas ideon pri la beleco de la freskoj de tiu pentristo de la dekkvina jarcento nomata en Italio Quattrocento.*

A.- En Lugano ankaŭ abundas la distraĵoj. Ni ne ankoraŭ konas la detalan programon de la kongreso de la esperanto-fervojistoj, sed ni jam antaŭscias, ke okazos folkloro aranĝo, koncerta vespero kaj tagaj kaj nokta ekskursoj. Perŝipe la kongreso migros sur la strangforma lago de Lugano, funikulare ĝi veturos al suproj, el kie oni malkovras mirindajn panoramojn.

Cl.- Tuj kiam ni ricevos la detalan programon, ni ĝin legos al vi. En la jaro de la Universala Kongreso en Usono, la migremaj esperantistoj, kiuj tamen ne povos veturi ĝis Ameriko, eble emos partopreni tiun kongreson, kie estos inter 500 kaj 600 partoprenantoj.

A.- Sed ni ne nur parolu pri esperanto-manifestacio okazonta en Svislando. Fine de tiu radio-prelego ni deziras atentigi la geaŭskultantojn, kiuj estas malpli ol 40-jaraĝaj kaj trapasis abiturientan aŭ similnivelan ekzamenon, pri la Someraj Universitataj Kursoj okazontaj en la urbo Lieĝo, Belgio.

Cl.- Tiuj kursoj malfermiĝos la 30-an de julio 1972 kaj daŭros tutan monaton ĝis la 27-a de aŭgusto. La celo de tiuj Someraj Universitataj Kursoj estas kontribui al la aplikado de la lingvo internacia en la universitata instruado.

Pri la Fervojista kongreso en Lugano
kaj pri la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo
Claude Gacond, 417-a radioprelego, 1971.10.06 & 09

A.- La studprogramo ampleksos du sekciojn : en lingvistiko la studantoj okupos sin pri ĝenerala lingvistiko, fonetiko, matematikaj metodoj en lingvistiko kaj lingvistiko de esperanto.

Cl.- En medicinaj sciencoj estas planataj jenaj studobjektoj : bazaj nocioj pri biologio, anatomio kaj histologio de la homa korpo, fiziologio de la homa korpo, farmakologio kaj oftalmologio.

A.- La lekciojn faros universitataj instruistoj kaj ankaŭ la gruplaborojn gvidos fakuloj. En ambaŭ sekcioj estos prezentataj eksterkursaj lekcioj pri apartaj temoj.

Cl.- La kursprogramo enhavos interkonajn aranĝojn, esperanto-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, ekskursojn kaj vizitojn, kulturen aktivadon.

A.- La partoprenantoj studos laŭ la jena skemo : En ambaŭ sekcioj ĉiu semajno estos en si mem kompleta unuo, tiel ke eblas efike ĉeesti dum nur unu, du aŭ tri semajnoj.

Cl.—Lunde ĝis vendrede okazos lekcioj kaj studaranĝoj. Sabate kaj dimanĉe prezentiĝos eblecoj por ekskursoj.

A.- Lekcioj, praktikaj kursoj okazos antaŭtagmeze. Posttagmeze la partoprenantoj individue studos aŭ grupe traktos la kursobjektojn. Ekzistos okazo ekzameniĝi pri ĉiu kurs-objekto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-